

## OPENBIBLIO EN ESPERANTO

*OpenBiblio*<sup>1</sup> estas senpage akirebla aŭtomatigita biblioteka mastrumsistemo. Ĝi kreigis en 2002 sub Ĝenerala Publika GNU-Permesilo, estas skribita per PHP-lingvaĵo kaj enhavas retkatalogon kaj funkciaron por katalogado, pruntado kaj administraj taskoj.

*OpenBiblio* estas dezajnita por malgrandaj bibliotekoj surbaze de la formato MARC 21<sup>2</sup>, kaj permesas importi rikordojn el ĉiuj kongruaj formatoj.

La sistemo konsistas el kvin moduloj: *Pruntejo*, kiu ebligas la administradon de pruntoj, rezervo kaj redonoj de materialoj; *Katalogejo*, por kontrolo de bibliografiaj rikordoj kaj ekzempleroj; *Administrejo*, kie eblas agordi kaj administri la sistemon; *Raportoj*, utila por krei raportojn pri la datumoj de la biblioteko; kaj *Retkatalogo*, kiu permesas konsulti rete la katalogon kaj tiel koni la havaĵon de la biblioteko.

Ĝi ne disponas modulon por kontrolo de aŭtoritatoj<sup>3</sup> kaj tio konstituas ties ĉefan mankon, sed malgranda biblioteko povas elturniĝi sen ĝi. Kompense, katalogado per ĉi programo estas simpla kaj intuicia, sekve do ankaŭ neprofesiulo povas relative facile prizorgi bibliotekon.

La ĉefa modulo estas *Katalogejo*. En ĝi, ĉiuj areoj kaj elementoj de la ISBD-normaro<sup>4</sup> estas koditaj en difinitaj kampoj kaj subkampoj. La subkampoj aperas sendependaj kaj kaze de ilia ripetiĝo en la bibliografia rikordo, ili ordiĝas laŭ alfabeto ordo. Tio devigas kelkokaze al konscia devojiĝo de la kataloga normaro por ke la donita informo estu komprenebla en la rikordo. Ĉi tiu maniero organizi la informon neniel malhelpas la funkciadon de la sistemo kaj ĝian utilon. Simple, oni devas kutimiĝi al ĝi.

Por faciligi la komprenon de la sistemo kaj gvidi ĝian uzadon, la Biblioteko Juan Régulo Pérez (BJRP)<sup>5</sup> verkis du dokumentojn: *Ĝenerale pri katalogado* kaj *Katalogado en Openbiblio*, ambaŭ desuĉteblaj ĉe *Bibliotekistejo*<sup>6</sup> kaj *Bitoteko*<sup>7</sup>.

La *Retkatalogo* ebligas serĉadon nur per aŭtoro, titolo aŭ fakvorto. Vortojn kun supersignoj oni devas tajpi ĉu rekte tiaj ĉu per x-sistemo. En ambaŭ kazoj la informo aperos supersignita. Nepras skribi la vortojn kun ĝustaj supersignoj aŭ aliaj diakritaĵoj. Ekzemple, por trovi la verkojn de Miguel Fernández, en la kampo "aŭtoro" oni tajpu "Fernández, Miguel" aŭ simple "Fernández" (aperus ĉi-kaze pliaj aŭtoroj kun sama familinomo). Serĉado simple per "Fernandez" (sen akcentosigno) donos nenian rezulton, krom eventualajn mistajpojn de la kataloginto. Se la supersignita litero estas majuskla, oni devas majuskligi ĝin por serĉado.

La ceteraj moduloj ne estas ankoraŭ plene uzataj de BJRP. Kiam tio okazos, priaj dokumentoj publikiĝos laŭeble en la *Bibliotekistejo*. Dume, eblas konsulti la katalunlingvan bitartikolon "*Openbiblio: programari lliure d'automatització de biblioteques*"<sup>8</sup> de Patricia Russo Gallo. Temas nur pri ĝenerala priskribo, ne pri manlibro, sed ĉiel ajn certe leginda por interesatoj.

La traduko, aplikado kaj disponigo de la esperanta versio estis sufiĉe problema. La interna organizo de la programo, malkohera kaj ne sistema, kaj la nekongruo de la esperantaj ĉapelliteroj kun ties agordoj kaŭzis teknikajn malfacilaĵojn, ne ĉiam facile solveblajn. Fakte, kelkaj partoj de la programo restas en la angla kaj certajn literojn de la internaĵoj ni devis lasi x-sistemaj ĉar la respondaj supersignoj misfunkciigas aŭ eĉ paneigas la programon. Tio tamen ne multe gravas ĉar temas nur pri la mastruma parto. La uzantoj de la retkatalogo ricevas la informon en taŭge ĉapelita Esperanto.

La esperantan version de la programo pretigis kelkaj kunlaborantoj de Hispana Esperanto-Federacio kune kun la prizorganto de BJRP, kie ĝi estis unue uzata en Esperanto-medioj. Poste, ankaŭ la Biblioteko de la grupo Frateco<sup>9</sup>, de Zaragoza, ekuzis ĝin.

Ni studos estonte la eblecon prilabori pli potencon programon senan je la mankoj de ĉi tiu. Ankaŭ tiun HEF publikigos siatempe. Dume, la esperanta traduko de OpenBiblio jam deŝuteblas el la *Bibliotekistejo*, je la dispono de ĉiu biblioteko aŭ asocio, kiu deziras katalogi sian kolekton kaj fari ĝin rete alirebla.

Ana Manero

*Biblioteko Juan Régulo Pérez*

*Hispana Esperanto-Federacio*

<sup>1</sup> <http://obiblio.sourceforge.net/>

<sup>2</sup> MARC: (*Machine-Readable Cataloging*, katalogado legebla per maŝino), komputila formato por interŝanĝi bibliografiajn informojn, disvolvita de la usona *Library of Congress* (Biblioteko de la Kongreso, t.e. de usona federacia asembleo) kaj nun uzata de multaj aliaj bibliotekoj.

<sup>3</sup> Biblioteka laboro konsistanta en elekto de la preferata nomo sub kiu la diversaj verkoj de iu aŭtoro aperos en la katalogo.

<sup>4</sup> ISBD: (*International Standard Bibliographic Description*, internacia norma bibliografia priskribo), normo por la transkribado de bibliografiaj informoj, reguliganta ties ordon kaj la uzandan interpunkcion.

<sup>5</sup> <http://www.esperanto.es/biblioteko/katalogo>

<sup>6</sup> <http://www.esperanto.es/biblioteko/bibliotekistejo>

<sup>7</sup> <http://bitoteko.esperanto.es/>

<sup>8</sup> <http://www.ub.edu/bid/19russo.htm>

<sup>9</sup> <http://www.esperanto.es/openbiblioZar/opac/index.php>

Bildo 1: Ĉefpaĝo



Bildo 2: Retkatalogo



(Julio 2011)